

## Redakta noto

Kelkfoje ŝtatoj asertas, ke ili kulturamas amikecon inter si. Propradire, tiu ĉi amikeco estas esence neimagebla. Ĉu ĝi konsistas el tio, ke ĉiuj anoj de iu ŝtato estas amikoj kun ĉiuj anoj de la alia? Aŭ ĉu nur la respektivaj ŝtatestroj estas amikoj, unu kun la alia? Nu, ŝajnas ke multaj kaj detalaj klarigoj estas necesaj por klarigi, el kio konsistas amikeco inter ŝtatoj. Antaŭnelonge dek novaj ŝtatoj aliĝis al Eŭropa Unio. Ĉu pro amikeco? Pro profito? En la EU-Parlamenton ili sendas, same kiel la "malnovaj membroj", delegitojn pri kiuj ili kredas ke ili kapablas "tiri el EU la plej multajn avantaĝojn por la propra lando".

Koncerne Eŭropon, la veraj eŭropanoj fakte estas nur la esperantoparolantaj ŝtatanoj. Ili ne daŭre demandas, kiun avantaĝon ilia hejmlando havas pere de la EU-membriĝo. Ili ne daŭre plendas, ke la eŭropmona "eŭro" devalutigis la belan iaman propralandan monsisitemon. Ili ne daŭre ĝemas, ke malfermaj landlimoj plifaciligas migradon en la propran landon kaj perdigas laborlokojn. Esperantistoj scias, ke Eŭropo kaj kulturo estas sinonimoj, ke nia komuna mono estas la videbla fino de la epoko de naciismo kaj interŝtataj militoj en Eŭropo. Kun diversaj, tamen komunaj kulturoj Eŭropo fariĝis Eŭropo, kaj ne celas nuran ekonomian komunumon, nuran komercan kuniĝon por memutilo kaj memprofito. Sed la interŝanĝo de kulturoj, tiom diversaj ĉe nun 24 eŭropaj membroŝtatoj, postulas egalrajtan komunikadon per neŭtrala internacia lingvo.



Vekiĝu, fraŭlino Eŭropo! Ni, la esperantoparolantaj sciencistoj, tehnikistoj kaj interesatoj pri sciencaj aferoj jam delonge kontribuas, eŭrop- kaj mondavaste, al vere kultura kaj scienca interkomunikiĝo.

Mi deziras distran legadon de tiu ĉi lasta SR-kajero de la jarkolekto 2004!  
Prof. d-ro R. Sachs, prezidanto de ISAE

**Laboristo,  
Arbeiter, ouvrier, workman, raboĉij, obrero, operaio  
– etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj  
pri la plurlingveco de Eŭropo**

Wolfgang VIERECK

**Antaŭrimarkoj**

Mia okupo pri ĉi tiu temo estas frukto de mia laboro pri la tuteŭropa projekto *Atlas Linguarum Europae*, la eŭropa lingvoatlaso. Ĉi tiu projekto jam ekzistas ekde tri jardekoj. Ĉiuj eŭropaj landoj partoprenas ĝin. Bulgario denove ek de 2002. Tio estas bona ekzemplo por la efikoj de lingvopolitikaj decidoj. Pro tio, ke la bulgarioj ne rekonis la makedonan lingvon, sed konsideris ĝin kiel okcidentbulgarajn dialektojn, ili ne nur ekzistis el la eŭropa lingvoatlaso antaŭ dudek jaroj, sed eĉ el la tutslava lingvoatlaso, la *Obščeslavjanskij Lingvistiĉeskij Atlas*. Sed antaŭ malmulte da jaroj la bulgara ŝtato rekonis Makedonion kiel ŝtaton kaj la makedonan lingvon kiel memstaran lingvon. Tio ebligis, ke la bulgaraj sciencistoj povis reveni al nia projekto. Memkompreneble ni tre ĝojas pri tio. Mi ne opinias, ke la makedona en nur malmultaj jardekoj tiel malproksimiĝis de la bulgara, ke oni povas karakterizi ĝin kiel memstaran lingvon. La malfacilan lingvistikan problemon „Kio estas dialekto?“ kaj „Kio estas lingvo?“ oni ja ankaŭ povas solvi politike per unusola streko de la plumo. Ion similan ni spertas en aliaj regionoj de la eksa Jugoslavio koncerne la serbokroatan. Oni nun parolas je la malplezuro de multaj eĉ pri kvar lingvoj: la serba, la kroata, la montenegra kaj la bosnia. La politiko havis influon ankaŭ ĉe la diferencigo inter la rumana kaj la moldava. Kiel ekzemplon el la sudo de Eŭropo, oni rigardu la ekscitiĝeme faritan debaton pri la leĝa stato de la valencia. Ĉu ĝi estas dialekto de la kataluna aŭ aparta lingvo? Oni povas menciigi konsiderindajn ekzemplojn ankaŭ el la centra Eŭropo. Tiele la malaltgermana respektive basgermana estas levita ekde januaro 1999 al regiona lingvo kaj de tiam estas sub la protekto de la eŭropa lingvoĉarto.



Ekde la akceptado de la lingvoleĝo en Luksemburgio la 24-an de februaro 1984 la ĝis nun tie parolata dialekto de la germana estas levita al nacia lingvo. Pro tio ke en Luksemburgio la franca estas oficiala lingvo, oni faris tiun leĝon ekskluzive en la franca kaj nomis tiun lingvon *Luxembourgeois*. La plimulto de la luksemburgoj nomas ĝin *Lëtzebuergesch*. Krom tiaj multfoje politike kaŭzitaj difinproblemoj ni ankaŭ estas konfrontataj kun la manieroj, kiel ŝtatoj traktas siajn minoritatojn kaj kun la konsekvencoj, kiuj elvenas el tio ĉe nia laboro pri la eŭropa lingvoatlase. Ekstreman ekzemplon montras Grekio kie laŭ oficiala versio ekzistas sole la greka lingvo. Nur en la lastaj jaroj tie komenciĝas certa pensado-ŝanĝo (vd. *Kiliari* 2002). Tiuj aspektoj de la lingvopolitiko estas indaj je aparta traktado, ĉar mia temo hodiaŭ estas alia.

Ankaŭ en mia debutprelego, kiun mi faris en la angla lingvo kaj kiu intertempe eldoniĝis en la *Acta Sanmarinensia* sub la titolo „Pri la kulturhistorio de Eŭropo“ (*Viereck* 2000), la *Atlas Linguarum Europae* estis mia temo, sed la vidpunkto estis tute malsama. La grava punkto estis la klarigo de la tielnomataj motivaj mapoj. Kiuj motivoj, kiuj kaŭzoj sin kaŝas malantaŭ la nomoj de certaj realaĵoj kiel bestoj aŭ malsanoj kaj kion oni povas konkludi el tio por la kulturhistorio de nia kontinento. Krom la lingvomapoj, kiuj registras motivojn surbaze de diafanaj vortkunmetoj, la eŭropa lingvoatlase entenas serion de onomasiologiaj mapoj. La onomasiologio okupiĝas kiel konate pri nomoj de difinitaj objektoj respektive nocioj. Tiuj onomasiologiaj mapoj estas interpretendaj etimologie kaj semantike. Tian provon mi hodiaŭ volas fari pri tute centra termino, nome "laboristo", kies prilaboradon por la *Atlas Linguarum Europae* mi transprenis.<sup>1</sup>

Antaŭe jen kelkaj ĝeneralaj rimarkoj al la eŭropa lingvoatlase. La *Atlas Linguarum Europae* oni povas nomi lingvoatlase de la kvara generacio, kiun antaŭiras atlasoj regionaj, naciaj kaj tiuj traktantaj lingvajn grupojn. Ankoraŭ ne ekzistas atlasoj de la kvina tipo, tio estas tiuj pri tutaj lingvofamilioj kiel la hindoĝermana aŭ – laŭ la pli

<sup>1</sup> Bedaŭrinde la donitaĵoj de la *Atlas Linguarum Europae* pri tiu termino estas tre malkompletaj. Pro tio estis necese, altiri multe da aldonaj fontoj, kiuj estas menciitaj en la literaturlisto. Ĉi-rilate mi elkore dankas al *Prof. Jost Gippert*, *Matthias Goldammer, M.A.*, kaj *Yvonne Goldammer, M.A.*, *Dr. Aschot Isaakjan*, *Prof. Fabrizio A. Pennacchietti*, *Prof. Semih Tezcan* kaj *Joe Zammit Ciantar, M.A.*, pro ilia helpo.

kutima termino – hindeŭropa, kaj de la lasta tipo, nome lingvoatlase de la mondo. La eŭropa lingvoatlase estas la unua kontinenta lingvoatlase, ĝi estas limigita nek politike nek lingve, sed jes geografie. La elekto de la kontinento neniel montras tendencon al eŭropocentrismo; ĝi nur spegulas la aktualan esplorstaton.

La lingva situacio en Eŭropo estas tre kompleksa. Sur ĝia tereno ekzistas eĉ ses lingvofamilioj, nome la altaja, hindeŭropa, kaŭkaza, semida, urala kaj vaska, al kiuj estas atribuitaj entute 22 lingvogrupoj. Ne necesas menciigi la multajn unuopajn lingvojn de ĉiu lingvogrupo por klare rimarki la altajn postulojn starigitajn al la sciencistoj, kiuj interpretas la heterogenajn donitaĵojn kolektitajn en 2631 lokoj de Islando ĝis Uralo.

Prioritaton havis la registrado de la plej malnovaj dialektaj esprimoj en la diversaj lingvoj. Ili estas transprenitaj al simbolaj mapoj kaj interpretataj laŭ bezono sinkrone aŭ diakrone, tio estas historie.

Jen pri nia termino laboristo. La demando de la *Atlas Linguarum Europae* estas: „Kiel vi nomas en via dialekto iun, kiu laboras en fabriko per siaj manoj por akiri sian vivtenon?“

### Etimologiaj konsideroj

Pri laboristo el la titolo de la artikolo oni ne demandis, ĉar tiu termino venas el la planlingvo Esperanto kaj pro tio estas de freŝa dato kaj facile analizebla: al la radiko *labori* aŭ *laboro* estas aldonita la substantiva sufikso *-ist* por la indiko de la profesia aktiveco kaj la substantiva finaĵo *-o*.

En la projekto de la eŭropa lingvoatlase nur donitaĵoj de la historie kreskintaj lingvoj estas enketataj. Sekve oni ankaŭ konsideras lingvovariaĵon.

En la etimologia parto de miaj rimarkoj mi distingas inter hindeŭropaj kaj ne-hindeŭropaj lingvoj. Mi komencos per la hindeŭropaj lingvoj, kiuj estis kaj estas dominantaj en Eŭropo.

### La hindeŭropaj lingvoj

La modernajn terminojn por laboristo en tiuj lingvoj oni povas "rekonduki" al jenaj ses radikoj.



## 1. Hindeŭrope \*uerg-, ,labori‘, ,fari‘.

Ĉi tiu radiko evoluis al komun-ĝermane \*werk-, tiam al malnov-angle weorc, malnov-altgermane werc kaj malnov-norde verk. Angle worker estas substantivo derivata de la verbo werken ,labori‘; unue dokumentita en la angla en la jaro 1340. Plie work troviĝas kiel unua ero en kunmetoj en kelkaj ĝermanaj lingvoj: angle workman (el malnov-angle weorcman[n]), malnov-altgermane werkmann<sup>2</sup> aŭ islande verkmaður (el verka [genitivo] kaj maður ,viro‘, kiu devenas de malnov-norde mannr).

Parenca al malnov-angle weorc estas malnov-angle wyrht, kaj la tiel nomita metateza formo wryht ,faro‘, ,ago‘ kaj la nomen agentis wyrhta, wryhta ,laboristo, faranto, kreanto, metiisto‘. En la moderna angla la metateza formo wright venkis, la alia formortis. Wright nuntempe aperas kiel persona nomo aŭ kiel dua elemento en kunmetoj kiel playwright ,dramverkisto‘, wheelwright ,radfaristo‘ aŭ cartwright ,ĉarfaristo‘. En nuntempaj anglaj dialektoj la simpla formo wright supervivis, sed nur malofte en la signifo ,laboristo‘, pli ofte en la pli malvasta signifo ,ĉarpentisto‘, ,lignaĵisto‘. De la hindeŭropa radiko devenas ankaŭ la greka vorto (F) ἔργον ,laboro‘ – kun eble parencaj vortoj en la avesta (varəz- ,agi‘), armena (gorc ,laboraĵo‘) kaj malnov-bretona (guerg ,efika‘).

## 2. Hindeŭrope \*orbh-, ,orfo‘, ,orfiĝi‘.

El la diversaj supozoj rilate al la etimologio de germane Arbeiter kaj ruse rabotnik ĉi tiu estas la plej verŝajna, ke ekzistis ĝermana verbo \*arbe-io kun la signifo ,orfiĝi‘, ,infano devigita al peza laborado‘, el kio estiĝis ĝermane \*arb-ejiðiz ,peno‘. Tio certe plu-evoluis al gote arbaiþ-s, malnov-altgermane ar(a)beit, malnov-angle earfoð(e) kaj malnov-norde erfidi. Pro la metatezo de la r antaŭ la vokalo (r-metatezo) estiĝis la malnov-eklezio-slava vorto rabota ,servuteco‘, ,sklaveco‘. Tiu sudslava formo verŝajne pruntiĝis en la

<sup>2</sup> Laŭ la vortaro de Grimm germane Werk(s)mann estis repuŝata ekde mezaltgermana tempo unue de handwerksmann kaj (hand-)werker, tiam ankaŭ de arbeitsmann kaj precipe de arbeiter. En la nuntempaj lingvoj malnoviĝintaj aŭ dialektaj esprimoj, kiel la werma (< Werkmann) dokumentita en la Walsergermana en la Aosta-valo (Italio) pro spacomanko nur kelkfoje estas mencioblaj.

rusan. Rabota ankaŭ estas dokumentita en la belorusa. Sed en la pola kaj ukraina ,laboro‘ signifas robota. Estas malfacila decido, ĉu rabotnik ,laboristo‘ deriviĝis de la adjektivo rabotnyi, de la substantivo rabota aŭ de la verbo rabotat‘. Ĉiukaze raboĉij estas substantivigita adjektivo, kiu formiĝis el rabota per la adjektiv-sufikso -j. Laŭ ĉi tiu etimologio latine orbus ,prirabita‘, greke ὀρφανός ,orfa‘, armene orb ,orfo‘ kaj sanskrite árbha- ,malgranda, malforta‘ havas identan originon.

## 3. Hindeŭrope \*leb-, \*lab-, \*lob-, ,libera‘, ,pendanta‘.

Ĉi tiu radiko, ankaŭ kun movebla s, kiu kelkfoje aperas ĉe vortlimoj kelkfoje ne, estas bone dokumentita en hindoĝermanaj – precipe ĝermanaj – lingvoj. Etimologiistoj samopinias ke el la komun-ĝermana verbo \*slæpan ,dormi‘ fariĝis malnov-angle slæpan, malnov-sakse slāpan, malnov-altgermane slāfan kaj gote slēpan. Estas ankaŭ samopinio, ke el hindeŭrope \*slab- fariĝis malnov-eklezio-slave slabu ,malforta‘, slave slaby ,malforta‘, latve slābet ,kolapsi‘, norvege slapa ,pendanta‘, malaltgermane kaj nederlande slap ,inerta‘ kaj germane schlaff, kio ankaŭ signifas ,inerta‘.

Latine labāre ,ŝanceliĝi‘ supozeble ankaŭ devenas de \*lab-. De labāre deriviĝas latine labor ,peno, laboro‘ kaj de tio plue labōrātor ,laboristo‘. La origina signifo de latine labōrāre estis ,ŝanceliĝi sub ŝarĝo‘. El labōrātor siaflanke fariĝis malnov-france laboreor, de kie ĝi eniris la anglan en la sama formo. Itale lavoratore verŝajne estas derivaĵo de itale lavoro, kio devenas de latine labōrātor.

## 4. Hindeŭrope \*op-, ,labori‘.

La origina signifo de la vortoj, kiuj devenas de ĉi tiu radiko, estas kamp-laboro. Supozeble per la influo de iu naturreligio la terminenhavo en kelkaj hindeŭropaj lingvoj fariĝis kult-ago.<sup>3</sup> Tiele la signifo de vede āpas- estas kaj ,laboro‘ kaj ,religia ago‘. Ĉi tiu evoluo estas dokumentita ankaŭ en sanskrito, en la latina kaj en la ĝermana. La grekaj vortoj ομπνη ,nutraĵo, nutrado, greno‘ kaj ομπνιος ,nutra‘

<sup>3</sup> Ke tio kelkfoje estas ĝusta transe de tiu lingvofamilio, montras komunseme  $\sqrt{cBD}$  kaj aramee  $\sqrt{PLH}$ , kiuj laŭokaze signifas ,labori‘ kaj ,adori, preĝi‘.



priskribas produktojn kaj rezultojn, kiuj estas forte ligitaj kun la agrikulturo.

Esprimoj, kiujn oni povas rekonduki al ĉi tiu radiko, kutime evoluis el la latina. Latine *operārius* supozeble devenas de la pluralo *opera* kaj ne de la singularo *opus*. Per aldono de la sufikso *-ārius* la substantivo fariĝis adjektivo, kiu poste estis uzata kiel *nomen agentis* (agantvorto). Tiam ĝi estis transprenita de kelkaj latinidaj lingvoj. Ekzemploj estas itale *operaio*, hispane *obrero*, portugale *obreiro* kaj france *ouvrier*. Rumane *uvrier* estas rekta prunto el la franca. Ĉe Plaŭto kaj Gelio *operārius* kune kun *bāiulus* respektive *bāiolus* ‚ŝarĝportanto‘ estas preskaŭ samranga kiel sklavo.

La latina radiko *opera-* venis kiel pruntvorto ankaŭ en la keltajn lingvojn: malnov-irlande *opar*, *opir* fariĝis irlanda-gaele kaj skota-gaele *obair*. La respektiva agantvorto estas *obraiche*, kiu kunmetiĝas el la latina pruntvorto kaj el la vira aganto-sufikso *-iche*. La esprimo en la nuntempa irlanda estas *fear oibre*. Ĉe tio *oibre* estas la genitivo singularo de *obair*. *Fear* deriviĝas de malnov-irlande *fer* kaj estas parenca al latine *vir*, gote *wair*, malnov-norde *ver*, malnov-altgermane kaj malnov-angle *wer* ‚viro‘. Do la signifo de la tuta esprimo en la nuntempa irlanda estas ‚viro de laboro‘.

### 5. Hindeŭrope \*dhē- en la signifoj ‚starigi, meti, fari‘.

Ĉi tiu radiko kun la sufikso *-lo* fariĝis malnov-eklezio-slave *dělo* ‚laboro, fano, aĵo‘. La vorto ekzistas kun la sama signifo en la rusa kiel *delo*, en la ukraina kiel *dilo*, en la bulgara kiel *dělo*, en la serbo-kroata kiel *djelo*, en la slovena kiel *delo* kaj en la pola kiel *dzielo*. Ĝi estas dokumentita ankaŭ en la ĉeĥa, slovaka kaj soraba. En la ĉeĥa kaj slovaka krome ekzistas *dělník* kaj en la slovena *delavec*; la signifo de ambaŭ estas ‚laboristo‘. *Dělník* deriviĝas de la substantivo *dilo* ‚laboro‘ kaj *delavec* de la verbo *delati* ‚labori‘ aŭ pli ĝenerale ‚fari‘.

La hindeŭropa verbo aperas en sanskrite *dādāhāmi* ‚starigi, meti‘ kaj ankaŭ en la avesta, armena, greka, latina kaj en la baltaj lingvoj. La komun-okcident-ĝermana verbo, kiu sekve ne estas dokumentita en la gota kaj malnov-norda, evoluis al malnov-angle *dōn* (novangle *do* ‚fari‘) kaj malnov-altgermane *tuo(a)n* (nuntempe *tun*).

### 6. Hindeŭrope \*men(a)k- ‚knedi, premi‘.

En ĝermanaj lingvoj ĉi tiu radiko aperas en la malnov-angla vorto *mengan*, el kiu en la nuntempaj anglaj dialektoj fariĝis *mang*, *meng* kaj *ming* ‚miksi, knedi‘, kaj ankaŭ malnov-altgermane *mengen* ‚miksi‘. En la litova vorto *mánkau* la radiko estas dokumentita en la pli malvasta signifo ‚knedi paston‘.

En la slavaj lingvoj la hindeŭropa radiko aperas en du malsamaj signifoj: unuflanke el la signifo ‚io dispremita, frakasita‘ evoluis la signifo ‚faruno‘ kaj aliflanke la signifo de proto-slave \**mōka* estas ‚peno, turmento, laboro‘. Ĉi tiu signifo nuntempe estas interalie dokumentita per la rusa kaj ukraina vorto *muka*, la bulgara vorto *māka* kaj la pola vorto *męka*.

Kelkaj aliaj lingvoj pruntis la vorton kune kun ĝia signifo. Ekzemploj estas litove *mūka* ‚torturo, turmento, doloro‘, albane *mund* ‚doloro, laboro‘, hungare *munka* ‚laboro‘ kaj komi-zirjane *muka* ‚doloro, torturo‘. En la rumana kaj moldava estas dokumentita *muncitor* nuntempe en la signifoj ‚laboristo‘ kaj ‚turmentisto, torturisto‘. La laste nomita signifo metas la vorton en interesan rilaton kun tiuj vortoj, kiuj deriviĝas de la latina vorto *trepālium* en la cetera latinida lingvo-regiono.

### 7. Latine *trepālium* ‚torturilo‘.

Antaŭe oni opiniis, ke france *travail*, provence *trebalh*, itale *travaglio*, hispane *trabajo* kaj portugale *trabalho* ‚laboro‘ deriviĝas de latine *trabs* ‚trabo‘. Nuntempe, pro la provenca vorto *trebalh*, kiu estas escepta rilate la unuan vokalon, oni opinias, ke ĉiuj nomitaj vortoj estas derivendaj de latine *trepālium* ‚torturilo‘ aŭ de la (ne dokumentita) verbo \**tripaliāre* ‚torturi‘.

Tiamaniere malnov-france *travaillēor* estas dokumentita en la signifoj ‚tortur-servisto‘ kaj ‚iu, kiu klopodas‘. Latine *trepālium* verŝajne devenas de latine *tripālis* ‚kun tri stangoj‘, kies modelo estis eble la greka vorto *τριπάσσαλον*.

Kiel la latina ekvivalento ankaŭ la greka vorto estas kunmetita el *τρέις* ‚tri‘ kaj *πάσσαλος* ‚paliso, stango‘. Kaj en la greka kaj en la latina ĉi tiuj vortoj estis teknikaj esprimoj por torturiloj.

Krom *trepālium* jenaj unuopaj vortoj estas menciendaj:



## 8. Armene *banvor* kaj *aŝchatavor*.

*Banvor* signifas ‚fabriklaboristo‘. Ĝi estas kunmetita el la radiko *ban*, la infikso *-v-* kaj la aganto-sufikso *-or*, kaj estas derivaĵo de la verbo *banel* ‚labori‘, kiu siaflanke estas derivita de la substantivo *ban* ‚aĵo, laboro, okupo‘. Kompletigoj per *banvor* ŝanĝas ties signifon. Tiel ekzemple *gjuĝhatntesakan banvor* signifas ‚kamplaboristo‘. *Ban-* estas unu el tiuj radikaj morfemoj, kiuj klare demandigas pri la rilatoj inter la kartvelaj respektive sudkaŭkazaj lingvoj kaj la hindeŭropaj lingvoj. \**ban-* estis rekonstruita kiel baza formo por la komun-kartvela pralingvo. Hodiaŭ formoj kun *ban-* respektive *bon-* signifas en la sudkaŭkazaj lingvoj ‚lavi‘ (komparu mingrele *bon-u-a* ‚lavi‘).

Plia vorto por ‚laboristo‘ en la hodiaŭa armena estas *aŝchatavor*. Tiu estas deverba substantivo, derivita de *aŝchatel* ‚korpe kaj mense labori‘.

## 9. Perse *kārgar* kaj kurde *kārker*.<sup>4</sup>

Sammaniere kiel en la persa el *kār* ‚laboro‘ plus aganto-sufikso *-gar* fariĝas la *nomen agentis* *kārgar*, tiel en la kurda el *kār* ‚laboro‘ plus sufikso *-gar* fariĝas *kārker* ‚laboristo‘. Krome en la kurda ekzistas jenaj leksemoj: *kirêker* (el *kirê* ‚salajro‘ plus *-gar*) kaj *xebatkar* (el *xebat* ‚laboro‘, kiu devenas historie el la persa kaj genetike el la araba *sabāt* ‚persisto‘, plus *-gar*).

## La ne-hindeŭropaj lingvoj

Mi jam kelkfoje referencis al la ne-hindeŭropaj lingvoj okaze de depruntaĵoj.

### 1. Altaĵaj lingvoj (ĉi tie tjurkaj lingvoj).

La malnova kaj origina vorto por ‚laboristo‘ en la turka estas *iŝçi* (< *iŝ* ‚laboro‘ plus aganto-sufikso *-çi*). Ĉe la unua Turka Ekonomia Kongreso (*İzmir* 1925) estis decidite, en ĉiuj leĝoj kaj dekretoj uzi nur tiun esprimon kaj ne plu la araban pruntvorton *amele*, kiun oni pritaksis malestimiga. Al la kunmetaĵoj kun *iŝçi* apartenas: *sanayi*

<sup>4</sup> La kurda estas parenca kun la persa, sed ĝi estas ekstere de la dokumentaĵo-reto de la *Atlas Linguarum Europae*.

*iŝçisi* / *endüstri iŝçisi* ‚industri-laboristo‘, *fabrika iŝçisi* ‚fabriklaboristo‘, *tarım iŝçisi* ‚kamplaboristo‘ kaj *İŝçi Partisi* ‚Laborista Partio‘.

*Amele* estas malnova pruntaĵo el la araba (< arabe *amala*, laboristoj; en la turka pli frue uzata kaj singulare kaj plurale, hodiaŭ nur singulare). En la 19a jarcento oni uzis la vorton *amele* ankaŭ por ‚fabriklaboristo‘ kaj ‚industri-laboristo‘. Ĝis 1925 ĝi estis la komune uzata kaj oficiala termino por ‚laboristo‘. Hodiaŭ oni trovas ĝin ankorau kelkfoje por ‚kamplaboristo‘ kaj ‚konstrueja laboristo‘.

Plia esprimo estas *emekçi* (< *emek*, peno, diligenteco, korpa kaj mensa laboro plus aganto-sufikso *-çi*). *Emek* estas malnova turka vorto, sed la derivaĵo *emekçi* devenas el la 1960aj jaroj kaj estas uzata preskaŭ ekskluzive de homoj kun socialisma pensmaniero.

Krom en la turka oni uzas la vorton *iŝçi* en la ujugura, uzbeka, tatara kaj azerbajĝana. En la turkmena ‚laboristo‘ estas *iŝger* (< turke *iŝ* plus la persa aganto-sufikso *-gar*). Tiun ĉi aganto-sufikson oni trovas ankaŭ en la kazaĥa *qızmatkār*, kie *qızmat* devenas de la araba *xidmat* ‚servo‘, transdonita tra la persa, kaj en la kirgiza *qızmatkār*. En la kirgiza *qızmatçı* estas aldonita al la jam menciita origine araba pruntaĵo la turka aganto-sufikso *-çi*. Tiu sufikso povas ankaŭ alpreni la formon *-çu* kiel en la kirgiza *jumuŝçu* (< *jumuŝ* ‚laboro‘ < malnovturka *yumuŝ* ‚servo‘). En la azerbajĝana ekde la 19-a jarcento estas ankaŭ uzata *fählä*, kiu estas araba pruntvorto. Arabe *fa'ala* ‚laboristo‘ estas derivita de la aktiva formo de la participo de la verbo *fa'ala* ‚fari, agi, igi‘.<sup>1</sup>

### 2. Kaŭkazaj lingvoj.

El la kaŭkazaj lingvoj troviĝas en la dokumentaĵo-reto de la *Atlas Linguarum Europae* nur la okcident- kaj orientkaŭkazaj lingvoj. En la gruzina, unu el la kartvelaj lingvoj, fabriklaboristo estas *pabrik'is mushak'i* kaj kamplaboristo estas *mic'is mushak'i*. Por la lasta oni povas ankaŭ diri *glëxi*, kiu signifas simple ‚kamparano‘, ‚servisto‘. Ambaŭ leksemoj estas en la gruzina tute netravedeblaj. *Mushak'i* estas jam dokumentita en la malnovgruzina. Surbaze de *musha-* estas formita la verbo *mushaoba* ‚labori‘, propre ‚esti laboristo‘. *Glëxi* estas supozeble persa prunt- respektive fremdvorto.

<sup>1</sup> En la araba skribo la substantivo ne estas egala kun la verbo, nur en la transliterado.



### 3. Semide/malte *haddiem*.

En la malta por ‚laboristo‘ troviĝas *haddiem* (laŭvorte ‚vira persono kiu laboras‘) < semide (kaj malte)  $\sqrt{h.d.m}$  < arabe خدم ‚labori‘. La femala formo estas *haddiema* ‚ina persono kiu laboras‘. Kiel ĉe kelkaj similaj substantivoj, *haddiema* indikas ankaŭ la pluralon. Pro tio la fina sono *-a* estas signo de unu el la pluralmorfemoj en la semida lingvo.

La *nomen agentis haddiem* estas uzata en la ordinara lingvo. Ĝi estas parto de kelkaj esprimoj kiel *Haddiem tas-Sena* ‚laboristo de la jaro‘ kaj ankaŭ *Il-Partit tal Haddiema* ‚la partio de la laboristoj‘. *Haddiem* povas esti uzata ankaŭ kiel adjektivo en la signifo ‚aktiva, asidua, dure laboranta‘.

### 4. Uralaj/finno-ugraj lingvoj:

#### (a) estone *tööline* kaj finne *työläinen*.

Estone *töö* kaj finne *työ* estas parencaj. Ili ambaŭ signifas ‚laboro‘ en neŭtrala senco. Per kvalifikaj adjektivoj *töö* rilatiĝas al aŭ mensa aŭ korpa aktiveco. Kiel unua elemento de kunmetaĵo estone *töö* precipe rilatas al korpa laboro en fabriko, tiel ankaŭ finne *työ*. *-line* respektive *-läinen* ambaŭ estas aganto-sufiksoj.

#### (b) Komi-siria, udmurta, mansa, samojeda, ĥanta.

Komi-siria *kerys* estas derivaĵo de la verbo *kerny* ‚fari, agi‘. La komparebla vorto en la udmurta estas *karny*. Sed en la udmurta ne ekzistas respektiva *nomen agentis*. La signifo de *kerys* ne nur estas ‚laboristo‘ en la profesia senco, sed ankaŭ ‚faranto, aganta persono‘.

Komi-siria *robot'nik* kun variantoj verŝajne estas relative nova pruntvorto el la rusa. La rusa depruntaĵo ankaŭ aperas en la mansa, ĥanta kaj hungara. En la samojeda la *nomen agentis rabočij* estas dokumentita, sed ne ties baza vorto.

#### (c) Hungare *dolgozó* kaj *munkás*.

*Dolgozó*, substantivigita adjektivo, devenas de *dolog* ‚devo, laboro‘. Ĝi estas pruntvorto el la slavaj lingvoj, komparu ekzemple ruse kaj sorabe *dolg* kaj pole *dlug* en la signifo ‚devo‘. De la hindeŭropa radiko ankaŭ deriviĝas gote *dulgs* ‚ŝuldo‘.

Hungare *munkás* estas *nomen agentis* derivita de *munka* ‚laboro‘, ‚realigo‘. *Munkás* havas slavan originon kaj ankaŭ estas dokumentita

en tiuj regionoj de Rumanio, kiuj limas Hungarion. Kontraŭe al *dolgozó* la vorto *munkás* precipe signifas korpe aktivan personon.

### 5. Vaske *langile*.

Ĉi tiu vorto deriviĝas de vaska *lan* plus la aganto-sufikso *-gile*. La sufikso finfine devenas de la verbo *egin* ‚fari‘. Origine la signifo de *langile* estis limigita je ‚kamplaboristo‘. Poste oni komprenis sub tio tute ĝenerale ‚laboriston‘.

### Semantikaj konsideroj

En antaŭaj tempoj laboro preskaŭ ĉiam signifis pezan kamp-laboron. Por tiaj penigaj okupoj oni uzis la servon de aliaj, se la propraj rimedoj permesis tion. Sekve baldaŭ estis privilegio de la altaj klasoj, malpli ofte korpe labori. La anoj de la altaj klasoj malŝate rigardis la homojn de la malaltaj klasoj, kiuj dependis de malpli altaj salajroj. Do ne surprizas, ke la esprimoj por ‚laboro‘ pleje deriviĝas de negativaj terminoj por ‚peno‘, ‚turmento‘ eĉ ‚torturo‘ kaj ‚sklavo‘. La *nomina agentes* signifantaj laboriston daŭrigis tiujn bazajn signifojn longan tempon.

En la frua periodo de la du grandaj mediteraneaj kulturacioj korpa laboro estis ŝatata. Ĉe Homero, Hesiodo kaj Katono la pozitiva sinteno al la korpa laboro estas nedubebla. Jene tekstas familiara citaĵo de Hesiodo: "Laboro ne senhonorigas, sed mallaboremo malglorigas nin". Sed ĉe la postaj grekaj verkistoj Platono, Aristotelo kaj Ksenofono la malestimo por la metiaj aktivadoj evidentiĝas. Ĉi tiu sinteno estis kaŭzita de la granda ofertado de sklavoj kiel malmultekostaj laborantoj kaj havas sian originon en la disigo de la mensa aktiveco disde la korpa aktiveco. Ĝi ankaŭ aperas fine de la romia respubliko en la verkoj de Cicerono, kvankam en Romo la malŝato de la man-laboro ne estis tiel disvastiĝinta kiel en la klasika Ateno. Por peza kaj malsaniga laboro oni eĉ dungis taglaboristojn por ne eluzi la propajn sklavojn. La vivo de laboristo do estis malpli valora ol tiu de sklavo.

En la fina periodo de la klasika antikva epoko la provizo je sklavoj ĉesis – kiel sekvo de la milita malforteco de la romia imperio. Pro tio la postulado pri pagataj laborantoj, precipe sezonaj laborantoj, kreskis. Tial, en tiu tempo, oni ofte dungis liberajn civitanojn kiel man-



laboristojn. Kvankam tiam la servoj de la laboristoj pligraviĝis, tio ne havis influon sur ilia malalta rango en la socia hierarkio.

En posta tempo datumas la esprimoj por laboristo en la signifo ,knabo' aŭ ,knabino', kiujn ni ankaŭ nuntempe trovas en kelkaj hind-eŭropaj lingvoj. Ili ebligas al ni ekkonojn pri la grava funkcio de infanoj en la ekonomia sistemo de frua socio. Ekzemple pole *chłopiec* ,knabo' aŭ ĉeĥe *chlapec* ,knabo' devenas de malnov-eklezio-slave *chlapŭ*, kies signifo estas ,servisto, sklavo'. En aliaj lingvoj la esprimoj por knabo aŭ knabino evoluis rekte el la termino ,laboristo'. Tiamaniere france *garçon* ,knabo' deriviĝas de malnov-france *garce* ,sklavo' kaj *garçon* ,servisto', kiuj siaflanke devenas tra franconie *wrakjo* de malnov-altgermane *wurhto* ,laboristo'. La francaj dialektaj formoj *ouvrière* aŭ *ouvraie* por ,knabino' aŭ *ouvrier/ouvrier* por ,knabo' konformas kun la normlingva esprimo *ouvrier* ,laboristo', kiu deriviĝas de la latina vorto por ,laboristo', nome *operarius*.

La jam menciitaj socie malmulte ŝatataj aktivaĵoj kaj profesioj, kiuj tamen estis tiel gravaj por la stabileco de ĉiuj klasoj, daŭrigis sian staton en la Mezepoko kaj Renesanco: la plej multaj esprimoj, kiuj nuntempe signifas ,laboristo', tiam indikis metiiston aŭ taglaboriston. Kutime ,laboristo' en la malvasta senco pli kaj pli rilatis al dependa pagata laboristo. Pro tio la meti-majstroj ne plu apartenis al la laboristoj. Eĉ la kamparanojn oni nur tiam nomis laboristoj, kiam ili devis fari servutojn.

Sed eĉ en la Mezepoko kaj Renesanco aperis tendenco al semantika retaksado. Tiamaniere en la franca lingvo Dio, kiel kreanto de la mondo, estas nomata *grand ouvrier*. Ankaŭ angle *wright* ekde la jaro 888 ĝis 1300 estas dokumentita en la signifo ,diaĵo, kreinto' kaj *worker* en rilato al ,Dio kiel kreinto' ekde 1382 ĝis 1602 kaj ankaŭ *workman* ,kreinto' ekde 1551 ĝis 1616. Pole *robotnik* ankoraŭ nuntempe havas ĉi tiun signifon en la lingvo de la eklezio.

Ĉi tiuj plivastiĝoj de la signifo devenas de la pozitiva kristana takso de la laboro, kiu metis la korpe laborantan homon super la mallaboremulon. Ĉi tiu kristana rigardo kondukis al nova sento de sinŝato ĉe la laboristoj. Ĝi ankaŭ estas la origino de ilia emancipado en la 19a jarcento.

Pro la industriigo en la 18a jarcento ofte ŝanĝiĝis la profesiaj kampoj de la korpe laborantaj homoj, tiamaniere ke la jam ekzistantaj esprimoj ankaŭ aplikiĝis al la personoj, kiuj devis akiri sian vivte-

non en fabriko. Tiel estiĝis centra grupo de industriaj laboristoj, kiujn oni povas nomi ,laboristoj en pli malvasta senco'. Sed la socia pozicio de la laboristo ne ŝanĝiĝis. Pro tio ke li devis fari malpuran kaj pezan laboron, li restis ĉe la suba fino de la socia ŝtuparo. La dungita laboristo apartenis al la plej suba, la kvara rango.

Nur pro la laborista movado, kiu komenciĝis en la 19a jarcento, tiu situacio ŝanĝiĝis. Ĉi tiu politika komponanto estas dokumentebla en la lingvoj ekde la mezo de la 19a jarcento almenaŭ per unu vorto. Tial fariĝis tiutempe en la germana interalie la kunmetoj *Arbeiterasoziation* ,laborista asocio', *Arbeiterbewegung* ,laborista movado' kaj *Arbeiterverein* ,laborista unuiĝo'. De *Georg Herwegh* devenas la kanto verkita en la jaro 1863 por la ĝenerala germana laborista unuiĝo kun jenaj konataj versoj:

**Viro de la laboro, vekigu!**  
**Kaj ekkonu vian potencon!**  
**Ĉiuj radoj staras senmove,**  
**kiam via forta brako volas tion.**

En la industria nacioj la korpe laborantaj homoj hodiaŭ montras grandan kvanton da memkonscio.

### Konsultita literaturo

- Andreassjan, Gr. M. 1976. *Germaneren – hajeren bararan. Jerewan: Jerevani hamalsarani hratarakĉutjun.*
- Aquilina, Joseph. 1987, 1990. *Maltese – English Dictionary. Valletta: Midsea Books.*
- . 1999, 2000. *English – Maltese Dictionary. Valletta: Midsea Books.*
- Braunert, Horst. 1990. "Arbeit." En: *Carl Andresen (eldonisto), Lexikon der Alten Welt, 240-241. Zürich/München: Artemis.*
- Bruß, Jochen. 1990. "Arbeit, Arbeitsethos." En: *Johannes Irmscher & Renate Johnhe (eldonistoj), Lexikon der Antike, 52. 10a tralaborita kaj kompletigita eld. Leipzig: Bibliographisches Institut.*
- Buchholz, Oda, Wilfried Fiedler & Gerda Uhlisch. 1977. *Wörterbuch Albanisch – Deutsch mit etwa 30.000 Stichwörtern. Leipzig: Verlag Enzyklopädie.*
- Chantraine, Pierre. 1999. *Dictionnaire étymologique de la langue Grecque. Paris: Klincksieck.*
- Cihac, Alexandre de. 1978 [1879]. *Dictionnaire d'étymologie daco-romane. Vol. 2: Eléments slaves, magyars, turcs, grecs-moderne et albanais. Osnabrück: Biblio Verlag.*
- Conze, Werner. 1971. "Arbeiter." En: *Joachim Ritter (eldonisto), Historisches Wörterbuch der Philosophie, 1: 487-488. Basel/Stuttgart: Schwabe & Co.*



- Corominas, Joan. 1954. *Diccionario crítico etimológico de la lengua castellana*. Bern: Francke.
- Diez, Friedrich C. 1853. *Etymologisches Wörterbuch der romanischen Sprachen*. Bonn: Marcus.
- Ebert, Joachim. 1984. *Die Arbeitswelt der Antike*. Wien/Köln/Graz: Böhlau.
- Eckert, Rainer, Emilia Crome & Christa Fleckenstein. 1983. *Geschichte der russischen Sprache*. Leipzig: Verlag Enzyklopädie.
- Fähnrich, Heinz & Surab Sardshweladse. 1995. *Etymologisches Wörterbuch der Kartwel-Sprachen*. Leiden: Brill.
- Fokos-Fuchs, David Rafael. 1959. *Syrjänisches Wörterbuch*. Budapest: Akadémiai Kiadó.
- Frisk, Hjalmar. 1954-1972. *Griechisches etymologisches Wörterbuch*. (Indogermanische Bibliothek. Zweite Reihe: Wörterbücher.) Heidelberg: Winter.
- Gamillscheg, Ernst. 1969. *Etymologisches Wörterbuch der französischen Sprache*. 2a, *tute nove prilaborita eld.* Heidelberg: Winter.
- Grimm, Jacob & Wilhelm Grimm. 1854-1960. *Deutsches Wörterbuch*. Eldonita de la Germana Akademio de la Sciencoj en Berlino. Leipzig: Hirzel.
- Grinda, Klaus R. 1975. *Arbeit und Mühe. Untersuchungen zur Bedeutungsgeschichte altenglischer Wörter*. München: Fink.
- Haneş, Gheorghina. 1981. *Dicţionar Francez - Român, Român - Francez*. 2a, *traborita kaj kompletigita eld.* Bucureşti: Editura Ştiinţifică şi Enciclopedică Bucureşti.
- Hauck, Friedrich. 1950. "Arbeit." En: Theodor Klauser (eldonisto), *Reallexikon für Antike und Christentum. Sachwörterbuch zur Auseinandersetzung des Christentums mit der antiken Welt*, 1: 585-590. Stuttgart: Hiersemann.
- Hitz, Hans-Rudolf. 1986. *Als man noch protokeltisch sprach. Versuch einer Entzifferung der Inschriften von Glözel*. 2a eld. Zürich: Juris Verlag.
- Holthausen, Ferdinand. 1934. *Altenglisches etymologisches Wörterbuch*. (Germanische Bibliothek. Vierte Reihe: Wörterbücher.) Heidelberg: Winter.
- Honti, László. 1982. *Nordostjakisches Wörterverzeichnis*. (Studia Uralo-Altaica 16.) Szeged: Attila József Univ.
- Junker, Heinrich F.J. & Bozorg Alavi. 1992. *Wörterbuch Persisch – Deutsch*. 7a eld. München, Leipzig: Langenscheidt Verlag Enzyklopädie.
- Kahane, Henry & Renée Kahane. 1962. "Contributions by Byzantinists to Romance philology." *Revue de Linguistique Romane* 26: 126-139.
- Kálmán, Béla. 1961. *Die russischen Lehnwörter im Wogulischen*. Budapest: Akadémiai Kiadó.
- Karjalainen, Kustaa F. 1948. *Ostjakisches Wörterbuch. Preparita kaj eldonita de Y.H. Toivonen*. (Lexica Societatis Fenno-Ugricae 10.) Helsinki: Suomalais-Ugrilainen Seura.
- Kiliari, Angeliki. 2002. "Sprachliche Heterogenität im griechischen Sprachraum." *Sociolinguistica* 16: 110-117.
- Klimov, Georgij A. 1994. *Einführung in die kaukasische Sprachwissenschaft*. Hamburg: Buske.
- Kluge, Friedrich. 2002. *Etymologisches Wörterbuch der deutschen Sprache. Preparita de Elmar Seebold*. 24a tralaborita kaj kompletigita eld. Berlin/New York: de Gruyter.

- Liddell, Henry George & Robert Scott. 1996. *A Greek - English Lexicon. With a revised supplement*. Oxford: Clarendon Press.
- Löpelmann, Martin. 1968. *Etymologisches Wörterbuch der baskischen Sprache. Dialekte von Lebourd, Nieder-Navarra und La Soule*. Berlin/New York: Mouton de Gruyter.
- Machado, José Pedro. 1977. *Dicionário etimológico da lingua portuguesa*. Lisboa: Livros Horizonte.
- Mayrhofer, Manfred. 1956. *Kurzgefaßtes etymologisches Wörterbuch des Altindischen*. Heidelberg: Winter.
- Miklosich, Franz. 1872. *Die slavischen Elemente im Magyarischen*. (Denkschriften der kaiserlichen Akademie der Wissenschaften. Philosophisch-Historische Classe 21.) Wien: Karl Gerold's Sohn.
- Neubauer, Walter F. 1976. "Strukturen des Selbstkonzepts und Verhalten bei jungen Arbeitern." En: Theodor Scharmann & Erwin Roth (eldonistoj), *Vom Proletariat zum Industriebürger*, 57-78. (Der junge Arbeiter. Studien zu einer Genealogie des Industriebürgers.) Bern: Huber.
- Onions, C.T., G.W.S. Friedrichsen & R.W. Burchfield (eldonistoj). 1966. *The Oxford Dictionary of English Etymology*. Oxford: Clarendon Press.
- Pârvulescu, Adrian. 1993. "IE. \*dhughatér 'daughter'." *Indogermanische Forschungen* 98: 55-91.
- Pauli, Ivan. 1919. 'Enfant', 'garçon', 'fille' dans les langues romanes. *Étudiés particulièrement dans des dialectes gallo-romans et italiens*. Lund: A.-B. Ph. Linsteds Universitets-Bokhandel.
- Plöger, Angela. 1973. *Die russischen Lehnwörter der finnischen Schriftsprache*. (Veröffentlichungen der Societas Uralo-Altaica 8.) Wiesbaden: Harrassowitz.
- Pokorny, Julius. 1959. *Indogermanisches etymologisches Wörterbuch*. Bern/München: Francke.
- Rix, Helmut & Martin Kümmel. 2001. *Lexikon der indogermanischen Verben. Die Wurzeln und ihre Primärstammbildungen*. 2a, *kompletigita kaj korektita eld.* Wiesbaden: Reichert.
- Scheler, Auguste. 1888. *Dictionnaire d'étymologie française. D'après les résultats de la science moderne*. Bruxelles: Muquardt.
- Schützeichel, Rudolf. 1995. *Althochdeutsches Wörterbuch*. 5a, *tralaborita kaj kompletigita eld.* Tübingen: Niemeyer.
- Simpson, J.A. & E.S.C. Weiner (eldonistoj). 1989. *The Oxford English Dictionary*. 2a eld. Oxford: Clarendon Press.
- Steuerwald, Karl. 1987. *Deutsch – Türkisches Wörterbuch. Almanca – Türkçe Sözlük*. 2a eld. Wiesbaden: Harrassowitz.
- . 1988. *Türkisch – Deutsches Wörterbuch. Türkçe – Almanca Sözlük*. 2a eld., *tralaborita kaj kompletigita*. Wiesbaden: Harrassowitz.
- Tamás, Lajos. 1967. *Etymologisch-historisches Wörterbuch der ungarischen Elemente im Rumänischen (unter Berücksichtigung der Mundartwörter)*. London/The Hague/Paris: Mouton & Co.
- Tereščenko, N.M. 1965. *Nemecko-Russkij Slovar' . S prilozheniem kratkogo grammatičeskogo očerka nemeckogo jazyka*. Moskva: Izdatel'stvo "Sovetskaja Enciklopedija".



- Titkin, Hariton. 1988. *Rumänisch-Deutsches Wörterbuch. 2a eld., tralaborita kaj kompletigita de Paul Miron. Wiesbaden: Harrassowitz.*
- Tobler, Adolf & Erhard Lommatsch. 1956-2002. *Altfranzösisches Wörterbuch. Wiesbaden: Steiner.*
- Vasmer, Max. 1950-1959. *Russisches etymologisches Wörterbuch. Heidelberg: Winter.*
- Viereck, Wolfgang. 2000. *Pri la kulturhistorio de Eŭropo. Kontribuado al la Eŭropa Jaro de la Lingvoj 2001 / Zur Kulturgeschichte Europas. Ein Beitrag zum Europäischen Jahr der Sprachen 2001. Acta Sanmarinensia vol. 5, n-ro 3.*
- (eldonisto). 2002. *Atlas Linguarum Europae. Vol. I, 6a volumero: Commentaires kaj Cartes. Rome: Istituto Poligrafico.*
- Walde, Alois. 1930-1956. *Lateinisches etymologisches Wörterbuch. 3a eld., tralaborita de Johann B. Hofmann. (Indogermanische Bibliothek. Zweite Reihe: Wörterbücher.) Heidelberg: Winter.*
- Wiedemann, Ferdinand J. 1964 [1880]. *Syrjänisch - Deutsches Wörterbuch: nebst einem Wotjakisch - Deutschen im Anhang und einem deutschen Register. London/The Hague/Paris: Mouton & Co.*
- Wright, Joseph (eldonisto). 1898-1905. *The English Dialect Dictionary. London: Frowde.*
- Žamanakakic hajoc lezvi bacatrankan bararan. Vol. I. 1969. Erevan: Hajkakan SSH Gitouthyouneri Akad. Hratarakchothjoun.

### Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Dr.h.c. mult. Wolfgang VIERECK  
p.a. Otto-Friedrich-Universität Bamberg  
An der Universität 9  
DE - 96045 - B a m b e r g  
GERMANIO

<wolfgang.viereck@split.uni-bamberg.de>

### Priaŭtora informo

La aŭtoro estas orda universitata profesoro por anglaj filologio kaj mezepoka literaturo kaj orda membro de *Academia Europaea* kaj efektiva membro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino.

## Utiligo de la akvoenergio iam kaj hodiaŭ

HASZPRA Ottó

Vi, muelsklavinoj, povas dolĉe dormi sur la kuŝejo,  
vane volas kok' matena vin jam alarmi per kriad',  
ĉar laboron vian donis al nimfaro la dia Deo:  
jen kiel facile tiuj saltas nun tra muela rad',  
tiel ke l' skuataj aksoj, radoradioj dum turniĝo  
turnas kun si ankaŭ l' ŝtonon por la dispistad' de la gren'.  
Gaje vivu ni, ĝojante pri l' donaco de granda riĉo,  
kiun la diino donas al ni jam sen ŝarĝo de pen'!

Por la eltrovo de la akvomuelilo  
de Antipatros SIDONIOS (ĉ. 100 a.K.)  
en la traduko de Kálmán KALOCSAY (1891-1976)

### Enkonduko

La celo de jena artikolo estas doni koncizan popularsciencan raporton pri la plej gravaj karakterizaĵoj de la energetika utiligo de la akvo de riveroj kaj riveretoj. La utiligon de la maraj ondoj kaj la tajdo mi ne traktos.

### Praaj akvomaŝinoj

La utiligo de la energio de la fluanta akvo komenciĝis en la unua jarmilo a.K., aŭ eĉ pli frue, plurloke, ekz. en Ĉinio kaj la Proksima Oriento. Atestas tion antikvaj priskriboj kaj desegnaĵoj, kaj eĉ ĝis la lastaj tempoj funkciantaj konstruciaĵoj. Temas plejparte pri **akvoradoj** (foje mirige grandaj, diametre 25 metroj) kun laŭranda padelaro, kiujn la frapado de la alfluanta aŭ surfalanta akvo de river(et)o turnadis (rotaciigis). La rotacianta akso de la akvorado movis kun si aŭ alian radon kun laŭrandaj siteloj, aŭ arkimedon ŝraŭbon (Bildo 1) por levi akvon el la sama rivero, aŭ pere de diversaj transmiŝiloj